

<p>Diritti linguistici, apprendimento delle lingue ed educazione per tutti. Simposio della conferenza internazionale dell'ilei 27 luglio 2006</p>	<p>Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj. Simposio de internacia Ilei-konferenco La 27an de julio 2006</p>
--	--



Dr. Aida Čižikaitė

Vilnius universitato Kaunas humanisma fakultato, Litovio

Poliglotoj — produkto de multlingva medio

Demandoj pri kapabloj por lingvolernado altiras intereson de publika opinio pro du kialoj. Unua: scipovi fremdan lingvon estas unu el la plej ĉiutagaj nuntempaj postuloj. Dua: regado de la lingvo *en la nivelo pli alta ol aliaj atingis*, gvidas homon al siaspeca mondo. Al tiu ĉi mondo kaŝe ĵetrigardi ŝatas tiuj, kiuj ne sukcesis ĝin eniri kaj restis aliflanke de barilo. Poliglotoj ĉiam vigligis imagopovon de samaĝuloj kaj de pli postaj generacioj. Legendoj pri ili iris el unu generacio al la alia. Bedaŭrinde, ili donas ne tute objektivan bildon pri tio, kiom da lingvojn scipovis en antaŭaj tempoj vivintaj lingvemuloj.

Dezirante almenaŭ parte trapasi barjeron de lingvo, oni devas studi lingvojn. Scipovi kelkajn lingvojn ne estas ŝiko, sed neceso de la vivo. Ekzistas landoj, en kiuj homoj parolantaj fremdajn lingvojn en certaj firmoj kaj oficejoj ricevas pli grandan salajron. Ekzistas parolturno: kiom da homoj scipovas lingvojn, tiom oni valoras.

Persono, kiu praktike scipovas almenaŭ dek lingvojn, povas nomiĝi poligloto (gr. *poli* — ‘multe’, *glotta* — ‘lango, lingvo’).

Ekzemple, oni asertas, ke Buda scipovis 150 lingvojn (aperis eĉ tradicioj de tiu ĉi aserto), kaj pri Mahometo oni diras, ke li „scipovis ĉiujn lingvojn“. Aulo Gelio asertas, ke Mitridato parolis en 25 lingvoj.

Se ni parolu pri virinoj, ni devus fieri pri reĝino Elizabeta kaj dukino J. Daŝkova. Samaĝuloj asertas, ke la reĝino Elizabeta ununura el virinoj de tiu epoko komprenis filosofion de Dekarto kaj kapablis ĝin traduki al aliaj lingvoj. Daŝkova estis elektita prezidantino de Rusia Scienca Akademiko en tiuj tempoj, kiam virinoj vidis nenion plu, nur kulregion.

Pri Ĝ. Piko de Mirandolo aŭdis eĉ ne lingvistoj. Pri li jam estas iom pli fidindaj datumoj. Estante 18 jara, li jam parolis en 22 lingvoj. Lia vivo, same kiel de ĉiuj „vunderkindoj“ estis mallonga. Li vivis nur 31 jaron.

Fiero de ĉeĥoj J. A. Comenius, komencinto de moderna lingvoinstruado, mem scipovis eĉ 12 eŭropajn lingvojn ankaŭ la araban, la turkan kaj la persan. Hungaroj povas fieri pri Ŝandoro Kereso Ĉoma: li scipovis 18 lingvojn kaj pretigis la unuan vortaton de la tibeta lingvo. Ruso M. Lomonosovo famiĝis pro tre malfacile kongrueblaj kapabloj: de poeto, de naturesploristo kaj de filologo.

El malnovaj tempoj tre interesa estas Tomaso Koriato — antaŭulo de ĉiuj hipi. Li vivis en fino de la 17 jc. Inter alie, li neniam pri io ajn okupiĝis. La vera lia prpfesio estis vagabondo. Al la vojo li pretiĝis estante 16jara, trapasis du mil mejlojn kaj dum tiu tempo ellernis 14 lingvojn. Li ĵuris neniam sidiĝi al veturilo kaj tiel agis. Reveninte post siaj vagadoj, multe vidintajn ŝuojn li pendigis sur pordego de preĝejkorto en vilaĝeto Odkomo en Anglio. Ekzistas homoj, kiuj asertas, ke ĝis nun ĉifonoj tie pendas.

Tamen plej multon da laŭroj meritas itala kardinalo Medzofanti. Li uzis tre ne kutiman manieron por lerni lingvojn kaj atingis nekredeble bonajn rezulton.

Kiam oni parolas pri Medzofanti, ofte oni disputas, kiom da lingvoj vere tiu ĉi homo scipovis. En kelkaj fontoj oni asertas, ke cent, tamen li mem en la jaro 1839 deklaris, ke li scipovas paroli „en kvindek lingvoj kaj dialekto de Bolonjo“ en la jaro 1846 li jam parolis „en spedeke ok lingvoj kaj kelkaj dialektoj“. Inter alie, tiom da lingvojn li lernis nek unu fojon forveturinte el Italio. Eĉ de sia naskiĝurbo Bolonjo li neniam veturis pli ol 40 kilometrojn.

Li naskiĝis en malriĉa kaj mulnombra familio. La onta kardinalo ne ankoraŭ frekventis lernejon, kiam oni rimarkis, ke li povas enparkerigi kaj sen eraroj ripeti substrate ekaŭditajn frazojn en la latina. Oni sendis lin studi teologion — tiutempe ĝi estis ununura por ne riĉuloj atingebla profesio.

Dum senĉesaj militoj en tiu tempo hospitalo de Bolonjo estis plenplena de vunditaj soldatoj, parolantaj en diversaj lingvoj. Midzofanti estis konfesprenanto de la hospitalo, do tie li komencis lerni lingvojn. Lia metodo de lernado estis tre simila l tiu Lajoŝo Koŝuto, nur elirpunkto por la kardinalo estis ne dramo de Ŝekspiro, sed preĝoj — „Patro nia“, „Saluton, Maria“ kaj „Mi kredas je Dio“. Li aŭskultis kiel tiujn preĝojn eldiras mortantaj soldatetoj, trafinte ĉi tien el ĉiuj flankoj de la mondo. El aŭdataj preĝoj li „priaŭskultis“ regulojn de vortfarado, sintakso kaj prononcado.

Dum mallonga tempo onidiroj pri tiu ĉi juna pastro disvastiĝis tra multaj landoj, nobeluloj, trapasante Bolonjon — kaj sacerdotoj kaj laikoj — ne preterlasis eblecon viziti lin. Medzofanti ankaŭ tiam estis modesta kvazaŭ infano kaj asertis, ke tiun rezulton atingi al li helpis du kvalitoj — energio kaj obstino. Scivolemuloj kun Medzofanti renkontiĝis en salono de palaco „Polyglot Academia della Propaganda“. Tie kolektiĝis eksterlandanoj, dezirantaj ekvidi miraklon kaj Medzofanti iris de unu grupo al la alia kaj respondis al la demandoj — al ĉiuj li respondis en tiu lingvo, en kiu estis starigita la demando. Laŭ asertoj, Medzofanti de unu lingvo al la alian transiris sen balbutoj kaj haltoj, eĉ laŭ petoj de scivolemuloj skribis epigramojn kaj konsilojn de relegia enhavo al speciale alportitaj notlibroj.

En unu kongreso de lingvistoj sensacio estis itala profesoro C Toljavini, kiu legis saluton al la delgitoj en 50 lingvoj. Dum paŭzo lin ĉirkaŭis ĵurnalistoj. La profesoro rakontis al ili, ke li estas honora tembro de 55 eksterlandaj sciencaj akademioj kaj bone konas 35 lingvojn, interkompreniĝi povas en 120 lingvoj kaj studis kelkcent dialektojn. Eksterordinara talento de Toljavini montriĝis ankoraŭ en infaneco: estatnte 12-jara li jam konis 7 lingvojn kaj 14-jara li iĝis studento. Fininte universitaton li ricevis doktoran gradon kaj atestilon, ke scipovas 22 vivantajn kaj mortajn lingvojn. Poste en universitato en Romo li prelegis en 25 lingvoj. Novan lingvon Toljavini lernis dum kelkaj monatoj aŭ eĉ semajnoj, ĉiutage dediĉante por tio 10-12 horojn (!).

En gazetaro oni skribis pri Ĝorĝo Smito, kiu laboris en sekretariejo de UN — li parolis en 69 lingvoj, (inter kiuj ankaŭ la litokan, la latvan kaj la estonon). Dum konkurso inter oficitistoj de UN gajninte la unuan lokon, pri la plej bona kono de la rusa lingvo, li ricevis premion — trisemajnan vojaĝon al SSSR. Ankoraŭ estantnte 17-jara, Smito finis liceon, studis en instituto de orientaj lingvoj en Parizo, staĝis en Kairo, studis en universitato en Strasburgo. Dum milito li estis malliberigita en koncentrejo en Buhenvaldo. Smito rakontis, ke en UN plej ofte oni parolas en 5 oficialaj lingvoj. Laŭ lia opinio, „... necesas paroli en tiu lingvo, kiun oni lernas. Viva lingvo, ĝia aŭtomatigado — cemento de scioj (...) Mia

memor estas malbona: ke mi ne forgesu tion, kion mi lernis, necesas almenaŭ du horojn monate praktiki paroladon “.

En la jaro 1969 gazetaro skribis pri studento de kvara kurso en politeknika instituto de Tomsk V. Vavilov, kiu estante 21 jara scipovis 23 lingvojn. Ĉio komenciĝis kiam al liaj manoj trafis tre interesa libro de scienca fantastiko en la pola lingvo. Ĉiutage li lernis po 50-60 novajn vortojn, kaj en la fino de la dua monato jam konis ĉirkau 3 mil.

En la jaro 1959 mortinta profesoro de Jena universitato Gestermano scipovis eĉ 120 lingvojn!

Kono de pluraj lingvoj ĉiam miris, legendoj pri poliglotoj iris de unu generacio al la alia. Leviĝas demando — ĉu tio estas atingebla nur por geniuloj kaj eksterordinare kapablaj homoj? Aŭ eble iĝi poligloto povas ĉiu?

Poliglotoj mem diras, ke neniu eksterordinaraj kapabloj por lerni lingvojn estas bezonataj. Jam menciita Medzofanti en la kjereton de unu el siaj admirantoj skribis: „Iu ajn povas stingi tion, kion mi atingis, se li kapablas konscii esencon de la lingvoj, kapablas analizi ilin, taksu kaj tion ĉi enparkerigi“. Docento de unu el Moskvaj altlernejoj T. Aŭerbacho asertas: „Dek lingvoj povas lerni ĉiuj, eĉ tiuj, kies memoro estas meza aŭ malforta“. Kiel ekzemplon li indikas germanan arkeologon Henrikon Ŝliman, kiu trovia Trojon, prikantitan de Homero. En infaneco H. Ŝlimano havis malbonan memoron, sed li sisteme trejnigis ĝin kaj atingis, ke dum unu tago sukcesis enparkerigi ĝis 20 paĝojn de prozo. Jam la unuan fojon laŭtleĝinte tekston, li memoris ĉirkau duonon de ĉiuj vortoj. Lerni la anglan kaj la francan li komencis laŭtleĝante ne malpli longe ol 1 horon kaj poste rerakontante enhavon. Post unu jaro li jam prefekte scipovis ambaŭ lingvojn. Poste novan lingvon H. Ŝlimano lernis dum du monatoj kaj povis libere uzi ĝin. Li ne enparkerigis apartajn vortojn kaj gramatikajn regulojn, ne tradukis tekstojn. Paroli kaj komuniki respondi la demandojn kaj demandi — nur tiamaniere oni povas lerni la parolantan lingvon. Ankaŭ antikvaj romianoj diris: nur parolante oni lernas paroli.

Ŝajnas, ke ĉio estas tre simpla. Do, tiukaze kial abiturientoj de niaj mezlernejoj, eĉ dum 8 lerninte fremdajn lingvojn ne sukcesas ellerni ĝin? Kaŭzoj estas eĉ kelkaj:

1. mankas intereso por lerni;
2. ne sufiĉa kvanto de lerno-horoj;
3. manko de lingva medio kaj manko de praktiko, komplikeco de la lingvoj.

Esploroj montras, ke por mezkapabla studento por lerni la lingvon bezonatas 500 horojn de aktiva laboro. Nur tiam li povas legi specialan fakan literaturon. Por bone ellerni lingvon, oni devas dediĉi ne malpli ol 2000 horojn. Sekve, ĉiutage po 2 horojn necesas lerni 1000 tagojn, t. e. preskaŭ 3 jarojn. En niaj mezlernejoj dum 8 jaroj al lernado de fremda lingvo oni dediĉas 580 lecionojn. Tempo devus sufiĉi almenaŭ por lerni legi ne komplikajn tekstojn. Ni ne troigos, dirante, ke ĉirkaŭ 10 % de abiturientoj de mezlernejoj kapablas legeti en fremda lingvo, tamen ankaŭ tiujn konojn ili rapide forgesas. Tamen en lernejoj, kie oni pli da atento donas por fremdlingva instruado rezultoj estas pli bonaj.

Ne eblas preterlasi ankoraŭ unu gravan kaŭzon, pro kiu oni ne ellernas eĉ unu fremdan lingvon, se ne paroli pli dekoj. Ĝi kaŝiĝas en la strukturoj de lingvoj. Ĉiuj etnaj lingvoj formiĝis kaj ŝanĝiĝis dum miljaroj, pro tio en ili troveblas kaj nelogikaĵoj kaj esceptoj. Malgraŭ, ke iuj asertas, ke ne ekzistas komplikaj lingvoj, tamen kelkaj al ni aspektas vere komplikaj pro tio, ke ni kutimiĝis al sistemo de sia lingvo.

En la lingvoj te vaste estas uzata vokalo *a*. Ĝin ni trovas en ĉiuj lingvoj, eĉ en la abĥaza, kiu havas nur du vokalojn. La sedanga lingvo (Vietnamio) havas eĉ 55 vokalojn. Malsama estas ankaŭ kvanto de konsonantoj: en la ubiha lingvo (Kaŭkazo) estas eĉ 80 konsonantoj, kaj en la rotoka lingvo el insulo Bugenvilo (La Nova Gvineo) estas nur 6 konsonantoj. Sonsitemon de la vojaua lingvo (Brazilaj indiĝenoj) formas nur 7 vokaloj (konsonantoj en ĝi mankas).

Niaj parolorganoj estas tre bone adaptiĝintaj por elparoli vortojn nur de la denaska lingvo kaj necesas „rompi langon“ ĝis kiam oni ellernas eldiri ruslingvan *в*, anglan *th*, francajn nazalajn sonojn. Ofte parolante en la rusa nia lango anstataŭ *я был* (‘mi estis’) eldiras *я бил* (‘mi batis’), kaj por nia paroliganto eble ne ĉiam klaras, kial ni estas tiom batalemaj. En la litova lingvo origine mankas sonoj *f*, *h*, (ili estas enkondukitaj tute antaŭ nelonge) kaj antaŭe oni prononcis *fabrikas*, *piŝika*. En la franca mankas sonoj *ç*, *dʒ*, *ĉ*, *ĝ*, *h*; finnoj ne havas konsonatojn *b*, *d*, *g*, *f*. Germanoj ne kapablas eldiri *j* kaj malmolan *l*. Malgraŭ, ke ĉinoj kaj japanoj skribas per la samaj hieroglifoj, tamen la unuaj ne havas sonon *r* kaj anstataŭigas ĝin per *l*. Tiamaniere „Kremlo“ iĝas „Kulinumulinu“. Kaj japanoj — inverse — ne havas sonon *l* kaj ĝin anstataŭas per *r*. Do, *Litovion* (origine Lietuva) ili nomas „*Ritowania*“ kaj internaciaj vortoj „*kilogramo*“ kaj „*milimetro*“ en la japana sonas „*kiroguramu*“ kaj „*mirimotoru*“. Ekzistas rakonto, ke japono, kiu prelegis en unversitato en Varsovio, diris, ke li estas rektoro de tiu ĉi universitato (li volis diri — lektoro). Tamen ni ne pensu, ke japanoj ne kapablas ediri *l*. Ni ĉiuj aŭdis niajn samideanojn multfoje kaj ili tute facile eldiras la sonon, nur foje miksas kun *r*.

Ne multas lingvoj, en kiuj ĉiujn vortoj oni akcentas sammaniere (francoj akcentas la lastan silabon, poloj — antaŭlastan, latvoj kaj estonoj — la unuan, en esperanto oni akcentas la antaŭlastan silabon). En mia gepatra lingvo (la litova) akcento saltadas eĉ en la sama vorto, do tute ne miras la fakto, ke oni ne ĝuste akcentas ne nur internaciajn vortojn, sed ankaŭ litvlingvajn, ekz.: *autobusas*, *kilometras*, *telefonas*, *moteris*, *medŝiaga*, *maŝina*... Tamen necesas prononci: *autobusas*, *kilometras*, *telefonas*, *moteris*, *medŝiaga*, *maŝina*.

Malsamaj sonsitemoj, ne kutima intonacio de frazo, ne ĝusta akcento estas la ĉefaj kialoj de la akĉento, kiu ĉiam indikas fremdulon. Ellerni paroli fremdan lingvon sen akĉento estas ege malfacile.

En la lingvoj abundas ne reguleco kaj esceptoj. Kiam infano nur lernas paroli, li laŭ intuicio provas krei novajn vortojn. Tiam plenkreskuloj instruas al li, ke tiamaniere diri ne eblas kaj infano po iomete ellernas paroli laŭ reguloj. Verkisto K. Ĉukovskij diris: „Ĉiu infano ekde aĝo de du jaroj iĝas genia lingvisto, sed atinginte kvin aŭ ses, perdas tiun geniecon“.

Ni esploru nur kelkajn en etnaj lingvoj ekzistantajn nelogikecojn kaj neregulecojn. Anticipe substrekindas, ke tiu propono ne strebas subtaksi etnajn lingvojn. Inverse! Ili ĉiuj perfekte konformas al siaj funkcioj. De patrino lernita lingvo estas la plej bela, plej perfekta, plej facila. Tamen ni imagu alilandanon, dezirantan lerni nian lingvon. Nun mi donos kelkajn ekzemplon, plejparte de la litova lingvo.

Vortoj de certaj lingvoj havas gramatikan genron. Ekz., en la litova, ke „brolis“ (‘frato’) estas virgenra kaj „sesuo“ (‘fratino’) viringenra estas tute memkompreneble. Sed kiu povas klarigi, kial „stalas, beržas“ (‘tablo, betulo’) estas virgenraj kaj „kèdè, liepa“ (‘seĝo, tilio’) jam iĝas viringenraj? Kaj ne en ĉiuj lingvoj koincidas: en la litova *arklys* (‘ĉevalo’) estas virgenra kaj en la rusa *лошадь* — viringenra, kaj en la germana *das Pferd* — neŭtra. En la germana eĉ ‘virino, knabino, fraŭlino’ (*das Weib, das Mädchen, das fräulein*) estas ne de virina, sed de neŭtra genro. Tamen, ĉu ni miru — ankaŭ en esperanto Dio estas li, do de vira genro...

Gramatika genro postulas, ke adjektivoj estu akordataj kun substantivoj ne nur per nombro kaj kazo, sed ankaŭ per genro. Tio ja estas aldonaj kaj ne malgrandaj malfacilaĵoj por eksterlandanoj lernante lingvon. Jen ekzemplo: ofte terminon pri geometrio „staĉiakmpis gretasienis“ (‘ortangulo paralelepipedo’) plej multo deklinacias jene: dativo — *staĉiakampiui gretasienini*, lokativo — *staĉiakmpyje gretasienyje*. Tamen, „staĉiakampis“ en tiu ĉi kazo estas adjektivo (‘rektangula’) kaj ne povas havi finaĵojn, karakterizajn por substantivo *-ni*, *-yje*. Do, en dativo kaj lokativo povas esti nur: *staĉiakampiam gretasieniu*, *staĉiakampiame gretasienyje* (samkiel: *dideliam* (‘por granda’) *gretasieniu*, *dideliame gretasienyje*). Tute alia afero, se ni deklinacias substantivon „staĉiakampis“: *ŝitam* (‘por tiu ĉi’) *staĉiakampiui*, *ŝitame staĉiakampyje*.

Diveni gramatikan genron el finĵo de la vorto tre ofte ne eblas kaj lernante oni devas enparkorigi ne nur vorton, ĝian signifon, sed ankaŭ ĝian genron, akcenton, skribmanieron, specificecon de deklinaciado.

Ke gramatika genro por la lingvo ne estas bezonata montras, ekz., la angla lingvo, kie kapro kaj kaprino estas nomataj per la sam avorto — *goat*. Dezirante substreki sekson, anglalingvanoj diras: *she-goat* (ŝi-kapro) kaj *he-goat* (li-kapro). La sama gramatika kategorio en malsamaj lingvoj estas esprimata diversmaniere (en la litova — per finaĵoj, en la aliaj povas esti artikolo aŭ iu alia teknika helpvorto, en kelkaj povas esti tute ne esprimata, en esperanto — por substreki inan sekson oni uzas sufikson -in-).

En ĉiu lingvo estas miloj da frazeologiaĵoj — stabiligintaj vortkunmetaĵoj, havantaj specifan signifon. Oni povas kompreni ĉiun apartan vorton de la kunmetaĵo, sed signifo de tuta parolturno restos ne klara, se ni ne aŭdis ĝin pli frue kaj ne lernis. Por mi tre klaraj estas litovaj eldiroj: *ĉi akĉi kristi, per danti traukti, ĉi galva ŝauti...* ('fali en la okulon' — plaĉi, 'tra dento tiri' — moki, 'en kapon pafi' — ekhavi la ideon), tamen sufiĉas ankaŭ por mi listigi vortaron de litovaj frazeologiaĵoj kaj mi konvinkiĝis, ke ne ĉiujn frazeologiĵojn eĉ en denaska lingvo mi komprenas sen klarigoj. Kaj kion Vi dirus pri ekzemple el la rusa lingvo laŭvorte tradukitaj eldiroj: '*sep vendredoj en la semajno*', '*per malanatiĉa (postaja) racio forta*'? Aŭ angle: '*havi okulojn en ies kapopinto*', '*pluvi per katoj kaj hundoj*', '*fari ŝnurojn el sablo*'?

Similaj parolturnoj, sendube, vigligas la lingvon, igas ĝin pli esprimriĉa, tamen ege malfaciligas lernadon — ne sufiĉas lerni nur vortojn kaj iliajn signifojn, necesas lerni plenajn vortkunmetaĵojn, kiujn en la lingvo estas miloj. Se signifon de la eldiro oni komprenas nebule, eblas diri sensensaĵon. Okazis, ke iu tradukisto ŝatis parolturnon *катертью дорога* ('vojo laŭ tablotuko'), kaj li komprenas ĝin kiel bondeziron 'bonan vojon'. Ni imagu, kiel devis senti sin tiu, al kiu tiu ĉi „bondeziro“ estis dediĉita (la parolturno signifas — iru for, de kie vivenis)...

Gramatikaj esceptoj komplikas lernadon de fremda lingvo. Do, ĉu eblas lingvojn normigi laŭ postuloj de logiko? Bedaŭrinde, tio ne eblas. Lingvistoj povas iome reguligi skribmanieron. Helpe de radio, televido, lernejoj ni povas iom kreksti akcentadon, malgraŭ ke tio estas malpli facile ol skribo — kutimo estas la dua naturo.

Esencon de sukceso en lingvolernado montras tre simpla ekvacio:

$$\text{Uzita tempo} + \text{interasoj} = \text{rezulto}$$

En tiu ĉi ekvacio oni ne skribas „kapabloj por lingvolernado“, sed skribas „interasoj“. Se sukceson de la lernado destinas nur kapabloj por lingvolernado, en tiu kazo la sama lernanto ĉiam same sukcese (aŭ ne sukcese) lernus ajnan lingvon. Ĉu eblas kapablojn por lingvolernado akordigi kun universaleco?

Ne ekzistas homoj (kompreneble, psike sanaj), kiuj ne sukcesus lerni unu — denaskan — lingvon en la nivelo, kiu konformas al grado de klereco. Tamen, ni facile povas trovi avineton, kiu dum mirinde mallonga tempo lernis la ekz., hispanan, kiam pretiĝis viziti sian nepeton, naskiĝintan en Suda Ameriko. Necesus aldoni, ke la avineto nenion komunan havis kun lingvoj kaj lernado entute dum pli mal pli lastaj 40 jaroj... Do, en ekvacio la vorton „interasoj“ oni povas ŝanĝi per vorto „motiviĝo“.

Lingvemulo bezonas tri aferojn: kapablon enparketigi vortojn, kapablon analizi sonojn kaj ilin imiti, logike pensi, ke estu pli facile trovi vojon en mondo de reguloj. Por deziranto akiri „lingvan senton“ tre gravas *maniero* de alproprigo, sed ne abstraktaj kapabloj por lingvolernado.

Estas interese, ke lertecon imiti formas ne nur *aktiva parolado*. En infaneco sufiĉas *bone aŭskulti* sonojn, kiuj ne ekzistas en denaska lingvo kaj homa orelo jam al kutimiĝas al tiuj strangaj sonoj kaj poste buŝo ellernas redukti tiujn ĉi sonojn, t. e., medio de fremda lingvo ne permesas „malmoliĝi“ por parolorganoj.

La maldekstra falnko de unue prezentita primitiva ekvacio devus havi iun *denominatoron* — negativan faktoron. Ĝin oni povus nomi konfuziĝo.

Uzita tempo + motiviĝo

= rezulto

Konfuziĝo

Konfuziĝo aperas tiam, kiam ni ne kuraĝas ekparoli en fremda lingvo, ĉar ni timas fari erarojn aŭ ni timas perdi ligojn kun sia denaska lingvo kaj ĝia strukturo kaj regulojn ni translokigas al lernata nova lingvo, malgraŭ, ke ni tre klopodas ne fari tion (same ni kaptas formojn de pli fure lernita *fremda lingvo*).

Ni rememoru Kleopatra. Plutarĥo asertas, ke ŝi scipovis ne nur la koptan, la stipan, la hebrajan, la araban, la asiran, kaj la medan, sed ankaŭ la persan. Kial tiu ĉi reĝino iĝis potiglotino? Tion ne malfacilas klarigi per la sama ekvacio. Kleopatra havis sufiĉe da tempo — ĉiujn laborojn faris sklavinoj, ŝiaj motivoj — ne haltigeblaj politikaj ambicioj, kaj ke konfuziĝo estis tre ege eta, okulfrape montras aventuroj kun Marko Antonio.

Do, ĉu ĉiu povas elerni dek lingvojn kaj iĝi poligloto? Mem poliglotoj asertas, ke homo povas libere paroli en 20-25 lingvoj kaj dum tuta vivo lerni ĝis 40. Eble ili pravas, tamen kiom da tempo kaj klopodojn tio postulos? Homo ne povas tutan sian vivon dediĉi nur por lingvolernado. Sendube, oni devas lerni lingvojn, temen scipovo de kelkaj lingvoj ne solvas lingvan problemon en ĝenerala senco. Kaj poliglotoj estis, estas kaj restos rara fenomeno, per tio mirigante plejmulton.